5-a Jaro. N-o 235 APERAS  SEMAJNE 4. Aprilo 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

INTELIGENTO, FILOZOFIO KAJ MARKSISMO

Ĉi tiuj tri ideoj postulas sendube vastan pritrakton. Mi provos tamen klarigi en mallongaj trajtoj ilian esencon kaj ilian reciprokan interrilaton tiom, kiom la spaco ebligas al mi. Kio rilatas inteligenton, tiu temo estis jam tuŝata en "S-ulo" n-o 223. Ĝi tre vulgariĝis en la ĉiutaga vivo. Oni ofte nomas inteligentulo personon, laŭ ĝia ekstera karakterizo, iun, kiu estas elegante vestita, kun ĉapelo ktp. Tio estas vulgara kaj malĝusta difino. Ĉar inteligentulo estas homo kun tre disvolvita intelekto, kiu kapablas orientiĝi kaj kompreni la ĉirkaŭon, ĝin digesti kaj transdoni digestite en alia formo.

Do inteligentulo ne devas esti nur titolita homo. Estas konate, ke simpla homo, kiu neniam eĉ lernejon vizitis, ofte eldiras spritajn parolojn, kiujn la titolita medicina doktoro ne komprenus. Aliel estas rilate la filozofi-studentojn.

La filozofio penas penetri en la forĵetitajn anguletojn de la tuta esto. Ĝi penas klarigi la plej malklarajn demandojn de la vivo ĝenerale, kaj de la homa vivo speciale. Ĝi ankaŭ penas klarigi la kaŭzojn kaj rezultojn de diversaj problemoj ktp. Kiel tia filozofio koincidas kun inteligento, filozofo do estas inteligentulo. En la mond-literaturo ni havas multajn inteligentulojn. Sed kiel ekzemplo servu al ni "Hamleto" de V. Ŝekspir. Hamleto estas inteligentulo. Kiam la spirito de lia patro postulas de li venĝi je la mortiginto, Hamleto ne plenumas tuj la venĝon, sed antaŭe pripensas, ĉu la spirito lin ne trompis. Por tia celo li antaŭe je psikologia maniero konvinkiĝas pri la kulpo de la mortiginto al lia patro. Hamleto estas pensulo. Li eldiras pensojn pri la morto, vivo, teatro ktp., kiuj ankoraŭ hodiaŭ parte ne perdis sian valoron. Hamleto bone komprenas la tutan ĉirkaŭon. Ofelion, kiun li antaŭe amis, li ne plu amas, ĉar ŝi ne estas pli ol floro, ŝi estas ilo en la manoj de sia patro, kaj ĉi lasta estas ilo en la reĝaj manoj ktp. Hamleto malamas tiajn homojn, kiuj ne havas memstarecon kaj kiuj ne kapablas pensi. Kaj vere ni lin vidas ĉiame pensema. Aliulo je lia loko pritraktus eble la tutan okazintaĵon kun lia patro kiel ordinaran familian aferon, Hamleto male vastigas ĝin kaj faras ĝeneralajn konkludojn, rilatajn ne nur al lia familio, sed ankaŭ al la tuta liatempa socio.

Kaj kompreni la tutan ĉirkaŭon, farante laŭ propra enrigardo ĝeneralajn konkludojn — jen la esenco de l' inteligento! Kiel inteligentulo, filozofo, Hamleto ne havas specialan mondkoncepton, kaj ofte ĉe pensulo, kiu konkludas laŭ propra mem-vidpunkto, la "mem-vidpunkto" por si estas filozofia mondkoncepto.

Ĝenerale disbranĉiĝas la filozofio tre vaste. Ĝi ĉirkaŭprenas preskaŭ ĉiujn regionojn de la homa penso. Sed ne ĉiuj ĝiaj branĉoj estas teorioj kaj ne ĉiuj teorioj estas konstruitaj laŭ sciencaj leĝoj. Pli klare: Teorio estas konstruita sur leĝoj, laŭ kiuj oni antaŭvidas la pluan evoluon, kiu devas esti tiel kaj ne aliel. Kaj estas kreita leĝo (natura aŭ historia) tiele, ke estas elektitaj la ĝeneralaj komunaj ecoj de donita regiono. Alivorte: leĝo estas la unueco en diverseco.

Tiel ekzemple teologia religio (Jehovismo, Kristanismo aŭ Islamo) kiel filozofio ne nur ne estas teorio, sed ĝenerale ĝi ne havas sciencan fundamenton. Male la marksismo kiel filozofio estas teorio. Teorio konstruita sur sciencaj leĝoj, laŭ kiuj antaŭvidiĝas la pereo de la kapitalista ordo kaj starigo de la socialista. Marks pri tio jenon rimarkigis: "La filozofoj — li diris — klarigas nur la evoluon de la mondo, sed ni volas la mondon transformi."

Do, el la plej gravaj diferencoj inter la marksimo kaj kelkaj filozofibranĉoj estas tiuj, ke unue la marksismo estas teorio, konstruita sur sciencaj leĝoj kaj due — plej grave: dum la filozofi-branĉoj klarigas nur la evolu-vojon de la mondo, la marksismo klarigante ĝin volas ĝin samtempe renversi. Esence la religio (teologia) havas por si "de dio donitajn" dogmojn, kiuj ne povas transformiĝi; la marksismo male, estante el kaj por la vivo, kiu ne haltas je unu loko en vivo, vidas la aferojn en ilia fariĝo, disvolviĝo kaj transformiĝo (la dialektika metodo).

Vere, ekzistas ĉie leĝoj, kiuj estas antaŭdeterminitaj. En la universo, en la organisma kaj senorganisma mondo kaj en la historio estas leĝoj antaŭdeterminitaj. Tio ankoraŭ ne signifas, ke oni ne povas eluzi ĉi tiujn leĝojn por disvolvi kaj transformi ilin. Tiel ekzemple la leĝon pri energio, kies kvanto ne povas pligrandiĝi, eluzas la fizikistoj kaj transformas ĝin eĉ en alian energion (meĥaniko). La heredoleĝon ĉe la best-mondo la biologoj eluzas por evoluigi aliajn specojn de bestoj (Darvina teorio).

La samo okazas en la moderna psikologio. La plej grava faktoro en la homaj agoj estas la instinkto. (La konscienco akompanas la instinkton.) La ennaskiteco, la heredeco de la instinkto estas leĝoj antaŭdeterminitaj. La tuta hodiaŭa edukado atentas pri tio por plibeligi aŭ plinobligi ilin, se estos bezonate.

La determinismo en la historia ma-

ojn, kiam la strikantoj decidis veni al Budapest, por protesti en la ministerio kontraŭ la sinteno kaj ekspluato de minkapitalistoj. Tiam la sekretario de ministoj kaj parlamenta deputito de soc.-dem. partio vojaĝis aŭtomobile antaŭ la amason nombrantan ĉ. 2000 personojn kaj klopodis ŝanĝi la decidon de l' manifestaciantoj kaj volis ilin reirigi. Kiam restis vanaj la provoj de l' deputitoj, tiam ili elektigis kelkajn personojn por iri al la parlamento kaj antaŭ la ministron de popol(mal)bonstataj aferoj. Tiel okazis. Kaj intertempe la amaso, kiu volis piede iri 8—10 kilometrojn sur la vojo plena da koto, atendis, ĝis la deputitoj revenos el la urbo. Ekpluvis, sed la amaso staris survoje kaj senmove. Dume ankaŭ la deputitoj alvenis, kiuj devis atendi sufiĉe longe, ĝis la ministro por popol-(mal)bonoj ilin akceptis. Poste li deklaris sian opinion. "Iru hejmen, komencu la laboron kaj mi klopodos ordigi la malkonsentojn inter vi kaj la minejposedantoj."

La deputitoj reiris kun la delegitoj de fakorganizo kaj parlamenta delegito. La amaso senpacience atendanta eksciis la opinion de l' ministro kaj, kvankam tute ne kontentigite, iris hejmen.

Komenciĝis intertraktoj, por relaborigi la strikantajn laboristojn. Fine ŝancelis la komuna premo de ministro, ĝendarmoj, minejdirektoro kaj gvidantoj de minista organizo la laboristan fronton kaj sen ajna rezulto ili komencis la laboron.

Tiu rezulto estas ja memkomprenebla, ĉar la bazo, laŭ kiu la ministoj eklaboris, estis la promeso de ministro, kiu devas defendi la interesojn de kapitalista ŝtato kaj tiun de la entrepenistoj.

La ministoj ne estis tuj redungataj, sed parto da ili je la preteksto, ke la minejo dum la striko estas iom difektiĝinta, komencis labori nur post semajnoj. Tio okazis en la komenco de januaro. Jam la 1-an de februaro montriĝis la rezulto de l' strik-ĉesigo. La ministoj ricevis nur la petitan kristnaskan helpmonon kaj kelkcendan salajroplibonigon, kiel, rezulton, de la ministra interveno, sed jam la 1-an de februaro estis maldungataj sesdek laboristoj, ĉiuj gvidantoj de la striko, kaj la 15-an sekvis denove sesdek maldungitoj. Tiuj laboristoj plejparte estas edzoj kaj patroj. La 16-an de februaro la ĝendarmoj arestis kvin K-dojn gvidintajn la strikon.

Tiel finiĝi˜ la movado, dank' al konfido je ministra decido anstataŭ je la propra forto de l' amaso, per akre sentebla fiasko. (343)

Per legado vi lernas . . . Legu regule . . . Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!

VIZITO AL LA SOVETIA ŜIPO "DEKABRIST"

Kiel maristo mi ofte havis okazon vidi sovetiajn ŝipojn, sed mi neniam havis okazon suriri kaj vidi ilin interne. Ekstere la diverslandaj ŝipoj ne multe diferencas unu de la alia. Sed interne, precipe en sovetiaj ŝipoj, oni ne nur vidas, sed ankaŭ sentas la malsamecon de ĉiuj alilandaj ŝipoj.

Antaŭ nelonge mi sciiĝis, ke la sovetia ŝipo "Dekabrist" estas ĉi tie en Antverpeno. Oni invitis min kun multaj aliaj Gek-doj por ĉeesti la festenon aranĝotan por la 5-a datreveno de la morto de Lenin. Ĉeesti la festenon kaj vidi sovetian ŝipon interne estis duobla ĝojo por mi. La ŝipo "Dekabrist" estas ĉ. 10 500-tuna (= 19 200 kub-metra) komerca ŝipo. En ĝia proksimo la plej diverslandaj ŝipoj estis alkajigitaj. Plej proksime kuŝis la franca pasaĝerŝipo "Formose" kaj aliaj — germana, angla, holanda — ŝipoj. Ĉiuj ŝajnas esti modernaj. Vizitantoj venis amase el multaj ŝipoj, ankaŭ el la urbo.

Tiu kunveno estis vere internacia. Ĉ. 200 Gek-doj devenintaj el proks. 15 landoj amasiĝis en la ŝipo. Kelkaj K-doj parolis pri la vivo kaj verkoj de Lenin. La paroladoj estis interpretataj 5—6-lingven.

La Babela Turo

La festeno estis vere solene impresa, sed tiun solenan harmonion tre malbonefike malagrabligis la multlingveco de la kunvenintoj. Por senti la skandalan malbenon de la multlingveco, oni devas ĉeesti tiajn kunvenojn. La babela ĥaoso eĉ pligrandiĝis post la memorparoloj pri Lenin. La sovetiaj K-doj alvokis la vizitantojn por fari demandojn pri ĉio, pri kio ili volas informojn koncerne la ŝipon, laborkondiĉojn en la ŝipo kaj en Sovetio kaj pri ĉia problemo rilata al Sovetio. La demandoj direktataj al la K-doj devis esti 2—3 -foje tradukataj, ĝis la sovetiaj K-doj ricevis la demandojn jam tre ŝanĝitajn laŭ la senco. Multaj volis demandi ion, sed ne estis interpretantoj por ĉiuj lingvoj. Kelkaj aliaj parolante nur iomete okcidentan lingvon ne riskis ekdemandi publike por eviti priridon. Kelkiuj fiaskis en sia lingva scio tuj post ekparolo. La demandoj estis kolektataj en notoj. Post kiam ne plu venis novaj demandoj, la sovetiaj K-doj komencis respondi la demandojn laŭvice. Tiam denove komenciĝis babela lingva komedio. 2—3, eĉ 4-foja interpretado, ĝis la respondo atingis la demandinton. La entuziasmaj demandintoj indiferentiĝis pri la afero dum tiuj lingvaj torturoj.

La elreviĝo estis kompleta, kiam la demandinto ricevis respondon 6-foje ŝanĝitan en senco. Mi tion ne demandis, — oni povis aŭdi multfoje. Oni ne komprenis la redemandon de la nekomprenintо, kio kaŭzis reciprokan intermalkomprenon. Kelkaj miaj K-doj, kiuj antaŭe iom malfavoris esperanton, post la kunveno konfesis al mi la urĝan neceson enkonduki la solvon de internacia lingva problemo en la laborplanon de Kom. Internacio. Tiuj K-doj estas poliglotoj kaj ili povis observi, ke la interpretantoj faris multajn erarojn je la malutilego de la festeno.

Ni SAT-anoj diverslandaj kvinope ĉeestis la festenon. Franca K-do (SAT 13 894) kaptis okazon en la fino de l' kunveno por altiri la atenton de la ĉeestantaro pri la interkompreniĝaj malfaciloj. Li lerte elmontris la bezonon de unu sola tutmonda interkomprenilo por la Proletaro. Li rekomendis lerni esperanton, por ke estonte K-do el ajna lando povu demandi sovetian K-don sen interpretanto. Ĝis la rekta interrilato internacia restos sola privilegio de interpretistoj kaj mensogantaj poliglotoj, la distanco inter kunsidantaj K-doj malsamlandaj ne interkompreniĝantaj ŝajnas esti pli longa ol tiu de Moskvo al Romo. La parolo de nia K-do estis aplaŭde aprobata de la restintaj ĉeestantoj.

Impresoj pri la ŝipo

Pro la lingva ĥaoso multaj Gek-doj forlasis indiferente la kunvenejon. Tamen granda parto vizitis la loĝ-, ban- kaj labor-lokojn kaj ceterajn aranĝojn. Feliĉe oni ne bezonas interpretiston por observi konkretaĵojn. Ni ĉiuj estis agrable surprizitaj pri la supereco de sovetiaj ŝipoj en aranĝo de ĉiuj vivbezonoj kompare al alilandaj ŝipoj. Hejtistoj de "Formose", ŝipo de la kultura franca nacio okcidenta, tre miris vidante la purajn dormejojn, banejon, manĝejon de la "barbaraj" bolŝevikaj hejtistoj rusaj. Ili rakontis, ke la loĝejoj kaj dormejoj de l' hejtistoj en la moderna "Formose" estas pli malpuraj kaj malkomfortaj ol porkejoj. La laborkondiĉoj en sovetiaj ŝipoj kontentigas ĉiun ŝipanon, dum en francaj, anglaj ŝipoj oni traktas la ŝipanojn bestece (vidu en "S-ulo" n-o 231). Mi mem povis konfirmi la asertojn de la vizitantaj maristoj francaj kaj alilandaj, ĉar ankaŭ mi laboras en granda pasaĝera ŝipo angla, kie la laborkondiĉoj kaj traktado al ni estas vere barbaraj.

Plej agrable tuŝis min, ke ĉiuj kulturmovadoj havas ne nur liberan vojon en sovetiaj ŝipoj, sed estas eĉ oficiale subtenataj kaj akcelataj. Dume en alilandaj ŝipoj kulturmovado tute ne aŭ preskaŭ ne ekzistas. La ĉefoj ne tolerus tiun ŝipanon, kiu sin kaj aliajn kulturus, edukus por scii iom pli kaj esti konscia. Cetere la brutecaj laborkondiĉoj mem en kapitalista ŝipo tute ne lasas tempon kaj emon al la ŝipanoj por sin klerigi. K-doj SAT-anoj, nepre vizitu la sovetiajn ŝipojn, se vi havos okazon vidi ilin en la havenoj de via lando.

Bonesper (SAT 29).

Iomete pri Hejmindustrio en la Metalmontaro (Ercgebirge)

Celo de unu el postkongresaj ekskursoj

Post la 9-a SAT-Kongreso en Leipzig, kiam la kongreslaboroj estos plenumitaj, ĉiuj kongres-partoprenontoj estas invitataj, amase partopreni la postkongresajn ekskursojn. Ankaŭ ni SAT-anoj en la "Ercgebirge" volas helpi, agrabligi kaj interesigi por ĉiama memoro la partoprenon ĉe la 9-a.

Ekskursontoj al "Ercgebirge" veturos post la kongreso de Leipzig karavane al Thalheim (elp. Talhajm), kie ili restos laŭ deziro ioman tempon por vizito kaj informiĝo pri la tiea ŝtrump-industrio. Thalheim, centro de ŝtrumpvara industrio en metalmontaro, estas loko, en kiu evoluas plej evidente tiu-industria tekniko. Antaŭ 50—100 jaroj ankoraŭ sidis niaj gepatroj kaj geavoj ĉe siaj hejmindustriaj maŝinoj. Ili ne nur sidis, sed sidadis ĉiutage ĝis noktmeze je la 24-a horo. Ho, kiel kruele aŭskultiĝas rakonto pri tiu tempo. Patroj, post panakira laboro hejmveninte, plusidis kaj hejmlaboris, tiele helpante al siaj edzinoj. Jes, la siatempa mizero estis tiom grandskala, ke la infanoj jam de sia 6-a vivjaro devis helpi panakire labori.

Gigante la ŝtrump-industrio jam disvolviĝis, sed ne nur en Thalheim, eĉ sur tuta terglobo. Ameriko estis la unua lando, kiu importis ŝtrumpmaŝinojn jam antaŭ la milito el Germanio, ĉefe el urbo Kemnic (germ. Chemnitz). Kun la maŝinoj la amerikaj kapitalistoj ankaŭ bezonis kvalifikitajn ŝtrumpfaristojn, kiuj ĉefe troviĝis en Thalheim Kaj post la jaro 1905 komenciĝis granda elmigrado de ŝtrumpfaristoj — senhalte. Ne tre ni ŝatas diri, ke jam mil laboristoj iutempe laboris en Ameriko, el kiuj ankoraŭ nun troviĝas kelkaj centoj en Usono. Notu, ke Thalheim nur havas 8000 loĝantojn — do okono laboris en Usono el tuta loĝantaro. Eble ankaŭ estas interese citi, ke en Ameriko eĉ troviĝas loko nomata Thalheim — loĝata de Thalheimanoj.



Thalheim (Talhajm) en Metal-montaro. Teksista kunveno

Ĝis nun la ŝtrumpindustrio ankoraŭ funkcias — sed ĝis kiam? Ĝis malonge post la milito preskaŭ ĉiuj landoj ankoraŭ importis ŝtrumpojn el nia lando, sed hodiaŭ jam estas la kontraŭo. Kiel tio okazis? Niaj ŝtrumpfaristoj ĉiam estis bone organizitaj, el kio rezultis, ke strikoj kaj bataloj, ofte eĉ longdaŭraj, estis plensukcesaj rilate salajro-plialtigon. Kompreneble per tio niaj ŝtrumpoj nun estas pli multekostaj ol tiuj, farataj de neorganizitaj laboristoj. Vi certe nun povas kompreni, ke oni en Germanio prefere aĉetas ŝtrumpojn ekz. el Japanio.

Tie en Japanio la porŝtrumpaj produktoj estas pli malmultekostaj ol ĉe ni, ĉar oni havas la silkon en la lando mem, kaj krome la japanaj laboristoj kontentiĝas per pli malalta salajro.

Certe en la ŝtrumpindustrio okazos la sama procedo kiel en la "Ercgebirga" pasamenta industrio, nome nia ĉi tiea *nura* industrio transiros eksterlandojn. Se ankaŭ en Thalheim la infanoj ne plu bezonas labori, kiel tio okazis ĝis antaŭ kelkaj jaroj, la ekskursontoj poste tion ankoraŭ vidos en la pli supra „Ercgebirge". Tie la edzinoj kaj infanoj de matene ĝis vespere ankoraŭ devas partopreni la panakiran laboron. Pri tio mi multon povus skribi, sed estas pli rekomendinde partopreni la ekskurson kaj mem vidi la faktojn. Tre interesa estas la hejmindustria produktado de infanludiloj, trikado de pasamentaĵoj ktp.

Estas preferinde, ke la Gek-doj ankaŭ kunportu migrad-vestaĵojn, por povi migrante viziti plej malgrandajn vilaĝojn. Kiel konate, ja en la montaro ne estas tiom da fervojoj ol en ebenaĵo. Do, Gek-doj, amase partoprenu, vi certe neniam forgesos la vidindaĵojn de nia regiono. Via ekskursgvidonto estas SAT-ano 8289.

Informpetojn kaj nepre ankaŭ antaŭanoncojn oni sendu al: Esperantisto Willy Richter, Innere Bergstr. 8, Thalheim (Erzgebirge), Germanio. Gek-doj en terorlandoj povas forlasi "Esp-isto".

FAKTOJ SEN KOMENTOJ

La venengasoj

D-ro Ira Ĝon's (angle: Jones), eminenta usona kemiisto, diris antaŭ nelonge, en parolado farita en Ĉikago, pri nova gaso nomata kazodilo izocianida: "La sola fakto enspiri ĝin sufiĉus por mortigi homon; grandkvante ĝi povus detrui armeojn tiel facile kiel homo povas estingi kandelon." Li ektraktis tiun temon nur kun malfacilo, ĉar la registaro ne deziras, ke ĝi estu diskutata. Li opiniis, ke la diversaj nacioj de la mondo ne aplikos volonte tiun ĉi venenon, ĉar ĝi mortigas neeviteble. Li aldonis: "Mi kredas, ke ili serĉas gason, kiu metos la homojn en staton de malkapablo agi, ne mortigante ilin." Tio estas parte neita de generalmajoro A. A. Fris (Fries), ĉefo de l' kemi-milita servo de Usono. Li konsentas, ke la registaro serĉas gason, kiu la homojn faru ago-nekapablaj, ne mortigante ilin. Sed li rifuzas konsenti, ke provo estas farita de la registaro por malhelpi la diskutojn rilatajn al venengasoj. (Laŭ "Amerika Nacio", 9. 1. 29.)

Usono akiras la mondmerkaton

La vendkontrakto de l' germanaj aŭtomobilfabrikoj Opel, Rüselshajm, al la "General-Motors-Kompanio" estas validigita. La usonanoj aĉetis tiujn fabrikojn por 120 milionoj da germ. markoj (ĉ. 29 milionoj da dolaroj) en formo de 48 milionoj da akcioj. La Opelfabrikoj, kiuj longe batalis kontraŭ pag-malfaciloj, finance resaniĝis je la prezo, ke la usonanoj instaliĝis tiel solide, ke ili estas plene akirontaj la germanan aŭtomobil-merkaton. Nur formale Opel-familiano restos direktoro. Fakte produkt-metodoj kaj -programo estos plene transformataj. La ĉefoj de "General-Motors" decidis investi ankoraŭ pliajn atentindajn sumojn en siaj germanaj fabrikoj.

Kio estas

DIABLIDOJ?

Rakonto pri knaboj, kiuj spite malbonŝanco kaj malagrablaj spertoj restas estroj de la situacio. La malgrandaj herooj trovos admiron kaj simpation ĉe la leganto.

48 paĝoj. Kun tutpaĝa titolbildo.

Prezo **0,60** mk. g.

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

FAJREGO EN PENSIONO

En la plej frua mateno de la 11-a de februaro, 13 ŝpinistinoj kaj 1 ŝpinisto estis brulmortigataj en Ŝizuoka, provinco en Japanio, de fajrego. Oni laboradis ĝis post la noktmezo, kaj pro glaciiga malvarmego unu laboristo metis multe da karboj en fajrujon faritan el ligno. La fajro trabruligis la fajrujon kaj ekflamigis monton da amasigitaj kokonoj. En kelkdek momentoj la fajrego forbruligis 7 fabrikdomojn kun pensiono. 13 laboristinoj ne povis forkuri tiel rapide kiel aliaj, kaj unu laboristo, kiu alkuregis por savi ilin, ankaŭ envolviĝis en la fajron, kaj 14 estis brulmortigataj. Inter la 13 virinoj du estis 16- kaj tri 15-jaraj.



Sur nia bildo 14 ĉerkoj, en kiuj kuŝas la kompatindaj viktimoj, staras apud la forbruligita konstruo, en kiu ili laboradis tiel penege sub kruelaj vivkondiĉoj kelkajn horojn antaŭe. Jenajn faktojn oni konstatis: 1. La gelaboristoj estis laborigataj ĝis post la 12-a horo noktmeze. 2. Ili laboradis pli ol 12 horojn ĉiutage. 3. La konstruo, en kiu estis laborejo kaj pensiono, estis tiel kruda kiel simpla barako. 4. En la pensiono estis nur unu ŝtuparo, kiu estis nur 1 metron larĝa. 5. Krom tiu tre mallarĝa ŝtuparo, la pensiono havis neniun alian enelirejon. 6. Ĉiuj fenestroj havis fortajn kradojn tute similajn al tiuj en malliberejo. Ili estis faritaj por antaŭgardi, ke la laboristinoj ne povu forkuri. 7. Oni ne konstruis aparte la pensionon. La teretaĝo estis laborejo kaj la dua etaĝo pensiono por la laboristinoj. Kiam en la ligna barako, la malsupra parto brulas, estas neeble al loĝantoj en la supra parto, la pensiono, forkuri tra la sola mallarĝa ŝtuparo. Estas eĉ mirige, ke aliaj multaj laboristinoj povis eliĝi tra tia eta elirejo. (4976)

Ekstera komerco de USSR en pasinta jaro

La plej granda parto de sovetia komerco okazas tra okcidentaj limoj en Eŭropo. La komerciro tra ĉi tiuj limoj prezentiĝas per jenaj tabeloj:

Eksporto

	Rubloj
Greno	34 200 000
Ceteraj terkulturaĵoj .	332 200 000
Nafto	97 900 000
Ceteraj industriaĵoj .	171 800 000
Sume por	636 100 000

Varenporto

	Rubloj
Maŝinoj (por fabrikoj k fervojo)	249 000 000
Krudaĵoj (kun kotono)	330 000 000
Duonfabrikaĵoj . . .	105 000 000
Terkulturiloj . . .	37 300 000
Manĝaĵoj	69 600 000
Ceteraj industriaĵoj .	29 100 000
Sume	820 000 000

Eksporto de la jaro 1928 malpliiĝis je 6% kompare kun eksporto de l' antaŭa jaro 1927, kaj varenporto kreskis je 31%.

Jen estas kompartabelo de bilancoj por 2 jaroj — 1927 kaj 1928:

jaro	eksporto	enporto	diferenco
1927	678,2	623,8	+ 54,4
1928	636,1	820,1	— 184,0

La bilanco de la jaro 1928 estas minusa. La kaŭzo kuŝas en tio, ke ege malpliiĝis eksporto de greno kompare kun la antaŭa jaro. Revolucio forigis grandajn bienistojn, kiuj produktis grenvaron. Etaj vilaĝaj mastrumoj produktas plejparte por propra uzo, ili estas ne sufiĉe varivaj[1]. Sed grandaj socialistaj mastrumoj ankoraŭ ne sufiĉe progresis pro manko da maŝinoj. Soveta registaro decidis kiel eble prosperigi agrokulturon por kontentigi bezonojn de kreskanta loĝantaro (ĉiujare plusiĝas ĉ. 3 000 000 da homoj) k de industrio. M. Krjukov.

[1] T. e. kapablaj produkti varon. Ni ne ŝanĝis la formon laŭ speciala deziro de l' aŭtoro. — Red.

P. Kropotkin
ETIKO
Volumo de 240 paĝoj. Entenas la altvalorajn moralsciencajn konsiderojn de la granda anarkista pensulo. Verko de ĉiama valoro.
Prezo: 1,80 mk. g.
Havebla ĉe Administrejo de SAT.

Diversaĵoj

La Internacio de l' kapitalistoj

Limoj ekzistas nur por la popolamasoj, ne por la negocemaj kapitalistoj. Jen novaj faktoj: La germana filmproduktejo UFA finkontraktis kun itala "Institute Nazionale Luce" por kune produkti kaj disvendi filmojn. Kemia fabriko Billvärder (Germanio) aniĝis al norvega "Jan", kemia fabriko en Frederikstad. Per helpo de l' "I. G.-Farb-Industrio" fondiĝas Internacia Societo por Kemiaj Entreprenoj en Basel. Sub gvidado de la silka fabriko Bemberg (Germanio) estas fondita en Anglio "British Bemberg Ltd." Maŝinfabriko Aŭgsburg-Nürnberg (Germ.) kontraktis kun sveda "Ljungsströms Vaporturbinoj" pro eluzo de la patentoj protektitaj per svedaj leĝoj.

Internacian sindikaton de konstruentrepenoj partoprenas firmoj el Germanio, Usono, Anglio kaj Francio. Ĝia sidejo estos en Teherano, ĝia celo: konstruigi fervojojn kaj havenojn laŭ komisio de la persa registaro. Germana societo por disvendado de elektra forto Erkens (en Aĥen, germ. Aachen) fondas kune kun nederlanda "Zuider Handel Mij", Vaals, la entreprenon "Vaalser Volveverij". Ŝpineja societo Stör (germana: Stoer), Leipzig, partoprenas ŝpinejan societon en Budapeŝt. Kunfandiĝo de "Alpina", germana horloĝista societo, kun Gruen-Gildo, kiu posedas 5 fabrikojn en Svisio kaj Usono, realiĝis.

Granda estas la nombro da tiaj "sennaciuloj". Ĉiujn citi malpermesas la loko. Oni diskonigu ĉi tiujn faktojn al laboristoj ankoraŭ kredantaj pri "patrio". B. Niĉe (3018).

La testika greftado

En Alĝerio la doktoro Voronof faris interesajn eksperimentojn pri greftadoj testikaj ĉe ŝafa kaj bova brutaro. La viandoproduktado estas pli forta ĉe bestoj, kiuj ricevis la testikan greftadon ol ĉe aliaj kaj, kio estas aparte interesa, tiu pliiĝo ŝajnas esti hereda. La meza pliiĝo de pezo en Alĝerio estis je 30% ĉe virŝafoj. La ŝafinoj deveintaj de virŝafoj greftitaj pesis je 24% pli ol tiuj de negreftitaj virŝafoj.

Ĉar cent virŝafoj greftitaj en 8 tagoj de 2 veterinaroj povas fruktigi 4000 ŝafinojn, oni povas el tio atendi pluson da 35 000 kg. da viando.

La germana loĝantaro koncentriĝas en urboj

En jaro 1871 loĝis 4,8 po cento de la germana loĝantaro en urbegoj. En 1900 kreskis la elcento ĝis 16,2. Kaj en la lasta statistika jaro 1925 amasiĝis 26,7% de la germana popolo en urbegoj. Do de 1871 preskaŭ sesobliĝis la elcento, dum la nombro de l' tuta loĝantaro kreskis nur je la duono, de 41 ĝis 62 milionoj. G. Niĉe, Chemnitz.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 4 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 4

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

La disvastiĝo de esperanto inter la liberpensularo tutmonda

Kvankam jam en jaro 1906 dum internacia kongreso de la liberpensuloj en Buenos-Aires oni estis akceptinta poresperantan rezolucion, tamen la liberpensa mondo ĝis fino de la mondmilito ignoris la mondhelplingvan demandon. Por propagandi esperanton inter liberpensaj rondoj, la liberpensaj esperantistoj fondis societojn. Antaŭ la milito ekzistis la organizo "Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj", kiu eldonis monatan gazeteton "Libera Penso". En la milito endormiĝis la nomita organizo. Post la milito estis fondata la esperanta organizo "Internacia Ligo de Liberpensuloj" kun la celo esperanton meti je la servo de la liberpensularo. Oni ankaŭ eldonis dumonatan gazeton "Liberpensulo". Pro financaj kaŭzoj la gazeto neregule aperis kaj post kvarjara ekzisto la organizo estis likvidata.

La laboroj de la liberpensaj esperantistoj estis sukcesplenaj. Per senlaca propagando la neesperantista liberpensularo komencis atenti esperanton kaj la esperantan movadon. Kelkaj organizoj subtenis la movadon morale kaj mone. En diversaj gazetoj aperis artikoloj pri kaj per esperanto, ankaŭ esperantlingve; kelkaj publikigis eĉ tutan esperanto-kurson. Gvidantoj de la liberpensa mondo lernis esperanton kaj la sekvantaj gazetoj liberpensaj portas la surpreson "Oni korespondas esperante": Le Matérialiste (Bruxelles), Bezboĵnik (Moskvo), Der Prol. Freidenker (Essen), De Vrijdenker (Amsterdam), Bezvirnik (Ĥarkov), Der Freidenker (Vieno). La pola gazeto "Zycie Wolne" publikigas la liston de enhavo ankaŭ esperantlingve.

Dum la ĉefkunveno de la diversaj liberpensulaj organizoj oni esprimis sian simpation por la internacia helplingvo esperanto. La unua kongreso de la proletaj liberpensuloj (IPF) akceptis jenan rezolucion:

"La unua kongreso de la proletaj liberpensuloj 1924 en Vieno elparolas sin por la neceso de la internacia interkompreniĝ-lingvo (esperanto) pro praktikaj kaj idealaj kaŭzoj kaj energie subtenos ĉiujn tiurilatajn agojn."

La ĉefkunveno de la Liberpensula Asocio en Aŭstrio (1-a—2-a de feb. 1925 en Loeben) akceptis jenan decidon:

"Esperanto kiel proleta kulturmovado estas akceptata en la statutajn celojn de la asocio."

La kvina landkonferenco de la pola Liberpensula Asocio akceptis ankaŭ poresperantan rezolucion:

"La landkonferenco de la Pola Liberpensula Asocio konstatis, ke la malekzisto de komuna internacia lingvo malfaciligas la interkompreniĝon inter la proletaro kaj per tio ankaŭ la kreon de internaciaj rilatoj. Ĝi decidas fari agojn celantaj la enkondukon de esperanto en la lernejoj. La konferenco alvokas ĉiujn laboristajn organizojn al propagando de esperanto kaj aranĝo de esperanto-kursoj."

La literaturo liberpensa esperantlingva, ankoraŭ ne estas multnombra. Ĝis nun aperis kelkaj libroj kaj broŝuroj; mi citas: Renan, La vivo de Jesuo, Krimoj de dio, Kio estas monismo, Kontraŭ dio, Kion vualas la biblio.

Hodiaŭ denove kolektiĝas la liberpensuloj-esperantistoj en la proleta esp. organizo "Sennacieca Asocio Tutmonda", formante "Liberpensulan Sekcio". Ĝi aperigas ĉiumonate "Liberpensula Paĝo"-n en la gazeto "Sennaciulo" kaj eldonas dusemajne Liberpensulan Gazetservon, kiu estas regule forsendata al la sekcianoj, liberpensaj organizoj kaj gazetoj. Dum la venonta mondkongreso de "Sennacieca Asocio Tutmonda" estos aranĝata fakkunsido de la liberpensuloj. La kongreso okazos dum 4.—10. aŭgusto en Leipzig.

Do la eldiroj pruvas, ke esperanto estas ŝatata kaj praktike uzata de la liberpensa mondo. Ofte oni aŭdas argumentojn kontraŭ esperanto. Sed pripensu! Ni ĉiam atente observu la kontraŭulojn. Se la starantoj sur la alia barikado uzas pli bonajn batalilojn ol ni, ni ankaŭ havigu al ni tiajn pli bonajn batalilojn. La burĝa mondo starigis la plej novajn eltrovaĵojn je sia servo, ekz. filmon, radion, ankaŭ esperanton. La katolikoj, kristanoj, spiritistoj, bibliostudantoj, teozofoj kaj aliaj sektoj uzas vigle esperanton. Ili eldonas internaciajn esperantajn gazetojn, aranĝas internaciajn kongresojn, eldonas grandnombran esperanto-literaturon — eĉ la tuta biblio estas tradukita en esperanton — aranĝas diservojn esperantlingve; eĉ la nova japana religia movado OOMOTO havas migrantajn propagandistojn, kiuj per helpo de esperanto disvastigas sian idearon en tuta mondo.

Pro la vigla uzado de esperanto ĉe niaj kontraŭuloj oni povus konkludi, ke esperanto estas danĝero por la libera penso, se ni ne uzus ankaŭ la neŭtralan helplingvon.

Ni esperantistoj batalas kontraŭ la lingva superstiĉo, kiu estas en la malĝusta, sed populara opinio ke la viva lingvo estas io absoluta, konstanta, kaj ke artefarita lingvo ne estas vivebla. Esperanto estas sendube fenomeno de la 20-a jarcento. Kiel per la laboro de la liberpensaj organizoj la scienco de Kant, Laplace, Darvin ktp. la homaron liberigas de la religia superstiĉo, tiel ankaŭ dank' al la laboro de la esperantistoj la moderna kompara lingvoscienco la homaron liberigas de la lingva superstiĉo. Ĝis nun la lingvo regis la homon. Per Esperanto la homo regas la lingvon, decidas ĝian strukturon kaj evoluon.

El Sovetio

La Bulteno de CK de SEU enhavas nun regule "Ateistan Angulon". En n-o 3 ni legas, ke la ruslingva gazeto "Bezboĵnik" (Sendiulo) jam havas kelkajn korespondantojn-esperantistojn en eksterlando. Dum tri monatoj la redakcio ricevis el eksterlando ĉ. 30 artikolojn. Du artikoloj de Lenin pri religio baldaŭ laŭ iniciato de Centra Oficejo de Ateista Unio aperos en la serio "Komunista Biblioteko" eldonata esperantlingve en Moskvo. La kajero estos havebla ankaŭ ĉe nia Sekcio.

Sekcianoj!

Nia Liberpensula Gazetservo plej bone funkcias en Germanio, Polio kaj Sovetio. La mondo liberpensa ŝajne nur ekzistas en la tri nomitaj ŝtatoj; el la aliaj landoj alvenas nenio. Ni petas vin insiste: ne nur estu paganta sekciano, sed kunlaboru vigle kaj sendu koncizajn notojn pri gravaj okazintaĵoj ĉe niaj amikoj aŭ malamikoj.

Sekcianoj!

La fakkunsidon dum la venonta SAT-kongreso aranĝos nia Sekcio. Demandojn k proponojn adresu al nia sekretario. Literaturon liberpensan liveras laŭ prezoj de la eldonistoj nia Sekcio; mendu ĉe ni; tiamaniere vi financigas nian entreprenon. Kiel kunlaborantojn ni notis jenajn K-dojn: 2798, 259, 8130, 5627, 150, 8740, 1225, 5129, 12 439 k K-don en Zeist.

En katenoj de la maljusteco

Virina Krestomatieto

40 paĝoj. Prezo: 0,60 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

DISKUTEJO

La "mikrokosma" Sennaciismo[1]

I.

Malkonsento en SAT, kunligita kun la demando pri akcepto de la programo de SAT, tre pliakriĝis. La komisiona projekto de l' programo pro granda malsamopinieco dum la lasta SAT-kongreso eĉ ne estis balotata. Kaj K. Lanti, verkinta laŭ komisio de SAT-Direkcio la "rimarkojn" al la projekto, diras en ĝi, ke "Direkcio en Parizo unuanime malkonsilas la alprenon de programo, kiu estus deviga por ĉiuj SAT-anoj; sekve se la kongreso havus aliun opinion, ni devus tiri la logikan konsekvencon el tio k transdoni la direktilon en aliajn manojn". La citaĵo montras la akrecon de la situacio, kvankam tute ne estas kompreneble, kiel oni povas postuli (krome — tiel ultimate[2]), ke programo estu akceptita n e d e v i g e p o r ĉ i u j SAT-anoj. Ja programo estas programo: ĝi estas aŭ deviga por ĉiuj membroj, aŭ ĝi ne ekzistu tute. La mezo ĉi-tie ne povas esti.

Tamen K. Lanti ne nur ne konsentas pri ĉi-tio, sed eĉ verkis sian kontraŭprogramon (broŝuro "La laborista esperantismo"), nomante ĝin "kvazaŭa programo" (v. antaŭparolon). Do ni havas nun en la SAT-vicoj programistojn, kvazaŭprogramistojn k kontraŭprogramistojn. Kvankam mi apartenas al la lasta kategorio, sed mi tute konsentas kun K. Lanti, ke pri la problemoj, tuŝitaj en la projektoj de programo necesas larĝa diskutado.

K-do Lanti asertas, ke L. Zamenhof "iniciatis lingvon" kaj samtempe "sukcesis doni al ĝi vivon k animon" (pĝ. 9). Ĉi-tie estas granda kontraŭdiro: la iniciatita de Zamenhof lingvo fariĝis lingvo viva nur en kolektiva praktika uzado[3].

K-do Lanti dediĉas tutan ĉapitron al demando pri "superpartieco" de SAT kaj ½ de la ĉapitro al partiaj frakcioj en ĝi. Miaopinie tie, kie estas partieco, tute ne povas esti nepolitikaj demandoj, plivere nepolitika subiro al demandoj. Se estas en SAT frakcioj[4], ili nepre plenumas en ĝi siajn politikajn taskojn. Tial pri superpartieco oni povas paroli nur kun la sama interna mensogo, kiel la burĝaro parolas pri "superklasa" ŝtato en la epoko de ekzisto de klasoj. Se dume diversaj laboristaj tendencoj trovas en SAT iun komunan lingvon, ĉi-tio estas n u r g r a d o en evoluo de esp. laborista movado.

K-do Lanti "insiste aldonas", ke SAT "estas plie s u p e r t e n d e n c a". Mi tre timas, ke tiu "supertendenceco" ne aliformiĝu finfine en "tendencan" servadon al SAT, kiel memcelo, kun forgeso pri relativeco k provizoreco de liaj taskoj en esp. laborista movado. Plimalsupre ni ankoraŭ vidos "la supertendencecon" de K. Lanti en la refrakto de liaj teoriaj okulvitroj:

Mi tute ne povas konsenti kun instruo de K. Lanti pri klerigo, eduko k kulturo.

1. "Homo povas esti tre klera, sed malgraŭ tio seneduka". Malpraveco de larĝa kompreno de la tezo estas videbla el la jeno. Kiel ekzemplon de tio, ke "socio el tre kleraj k sciencoriĉaj homoj povas tamen esti barbara", K. Lanti prezentas "kapitalistan sociordon, kie homoj malsatas, dum aliaj malsaniĝas pro troa abundeco da ĝuaĵoj" (pĝ. 22). Laŭ mia, ne "superklasa"[5] vidpunkto, ĉi-tio estas nur kalumnio kontraŭ kapitalistoj: rilate al sia propra klaso ili estas nemalpli edukitaj, ol laboristaro (se ne pli edukitaj, ĉar bedaŭrinde ankoraŭ multaj laboristoj permesas sin kapti en la retojn de burĝa "superklasa"[5] "bonedukeco").

2. "Oni povas esti klera, boneduka k tamen ne kultura" (pĝ. 23). Kiel praktike distingas Lanti inter klereco kaj kulturo? Jen kiel: "Nura klereco iel pensigas pri perfekta, delikata maŝino, sed kulturo donas la ideon pri krea laboro". Membroj de SAT, starantaj ĉe maŝinoj, ĉu vi komprenis la penson de K. Lanti? Laŭ mia kompreno, ekster laboro pri maŝinoj (pri ilaro) kaj ekster ilia bazo ne estas k ne povas esti krea laboro[6].

E. Spiridoviĉ (3712).

---

[1] **Atentigo.** — Por ŝpari lokon, ĉi-foje mi ankoraŭ kontentiĝos per simplaj piedpaĝaj rimarkoj, en la espero, ke la legantoj atente legos aŭ relegos la atakatan verketon por decidi mem, ĉu la ĉi tie metitaj kritikoj valoras aŭ ne kiel refuto. — E. L.

[2] Estas en nia diro nenia ultimato. Oni plurfoje konsentis, ke ni direktis la SAT-ŝipeton laŭ ĝusta, sukcesiga vojo. Se oni volus trudi al ni gvidprincipojn, kiuj ne akordiĝas kun tiuj, kiujn ni ĝis nun obeis, estas tute logike k nature, ke ni ne plu povus akcepti la respondecon direkti laŭ vojo, kiun ni opinias erara k pereiga.

[3] Jen vere bela eltrovo! Ĉiu ja bone scias, ke lingvo servas por "kolektiva praktika uzado". Z. sekve ne povis kontentiĝi dum sia tuta vivo praktikadi sian lingvon nur kun si mem, kvankam li tion faris dum kelkaj jaroj. Estas ja bone konate, ke antaŭ ol publikigi sian unuan lernolibreton, li multe tradukis en k el sia lingvo k tial esp-o jam havis vivon k animon, kiam ĝi aperis. Estas tamen tute ĝuste diri, ke Z. nur iniciatis esp-on. Oni ja devas atenti la fakton, ke post 41 jaroj nia lingvo ne ankoraŭ posedas teknikajn vortarojn por ĉiuj fakoj, ne eĉ sufiĉe ampleksan komunan vortaron. Tial ke nuntempe esp-o estas ankoraŭ ĉiurilate finpreta oni do prave povas diri, ke Z. nur iniciatis lingvon al kiu li tamen donis vivon k animon. La kontraŭdiro sekve ekzistas nur en la fantazio de K-do Spiridoviĉ.

[4] Ĉiu informito bone scias, ke ekzistas partioj, kiuj devigas siajn anojn labori frakcie en ĉiuj organizoj al kiuj ili apartenas. Tial ke en SAT ne devas esti io ajn, kio kontraŭus al la instrukcioj, kiujn donas al siaj anoj iuj partioj, estas do necese, ke SAT permesu la ekziston de frakcioj **el** SAT-anoj. Sed en "La Laborista Esperantismo" estas klare dirite, ke SAT ne respondecas pri la laboro farata en la frakcioj, kiuj fakte funkcias e k s t e r ĝi. En tio la frakcioj diferencas de la sekcioj, kiuj funkcias **en** la kadro de SAT. Tio estas klara k K-do Sp. penas vane nebuligi la demandon.

[5] Necesas ĉi tie averti la leganton, ke nenie en "La L. E." estas parolite pri superklasa edukado. Sekve la citsignoj ĉe tiu vorto estas tute erarigaj. Laŭ la kompreno de K-do Sp. pri tiu ĉi demando oni logike devus rezigni ĉian edukadon. Kaj tamen estas fakto, ke burĝoj perfidas sian klason, aliĝante al la revolucia movado k ankaŭ proletoj sukcesas liberiĝi el la burĝa ideologio. Cetere oni povas facile klarigi, ke ĉiu ajn eduksistemo devas enteni kelkajn ĝeneralajn principojn, kiuj valoras por ĉiuj epokoj por ĉiuj lokoj, por ĉiuj medioj k klasoj. Devigite koncizigi kiom eble plej mian verketon, mi plene konscias, ke pri klero, eduko, kulturo mi ne povis diri ĉion direndan k sekve miskompreno estas ebla.

[6] Kiel mi diris pli supre, la enhavo de mia verketo estas tiom koncizigita, ke tio povas pri kelkaj punktoj kaŭzi erarkomprenon. Mi devus pli detale klarigi, citi faktojn k ekzemplojn — unuvorte verki 100-paĝan volumon anstataŭ 38-paĝa. Mi dubas tamen, ke homo, kiu legas kun vera deziro kompreni, povas alveni al tiaj strangaj konkludoj, kiaj estas tiuj de K-do Sp. Cetere la multaj leteroj, kiujn mi ricevis, atestas, ke K-doj bone komprenis mian penson.

Kiam mi parolas pri krea laboro, la tuta kunteksto montras, ke ne temas pri simpla, mekanika, seniniciativa laboro, kiel tiu, kiun devas plenumi laboristoj ĉe maŝinoj aŭ ĉe rondirantaj stabloj. Por la K-doj, kiuj vere deziras kompreni mian diron, mi klarigu: Estas laboristoj, kiuj, forlasinte la fabrikon, eniras drinkejon k tie kartludas, babilaĉas, ebriiĝas... aliaj iras en studrondojn, vizitas vesperajn kursojn... La unuaj tute ne celas, eĉ ne pensas pri klerigado, edukado, kulturo, dum la aliaj streĉas ĉiujn siajn fortojn por sin levi spirite k morale. Kelkaj, lerninte esp-on, starigas SAT-rondon; ili penas eltrovi pli k pli taŭgajn procedojn por instrui, propagandi, apliki esp-on, por progresigi SAT-on ktp. Nu, mi opinias, ke tiuj lastaj laboristoj faras krean laboron, dum la unuaj ne faras. K-do Sp. devus scii, ke krei k produkti ne estas samsignifaj...

PRI "MOBILIZI"[1]

Ĉu la "subskriboj" pri "rifuzo de militservo" ne estas ankaŭ batalo kontraŭkapitalisma, porpaca? Mi asertas, ke ili ankaŭ estas proleta batalrimedo. Certe la subskriboj sole tute ne sufiĉus por eviti imperialisman militon. Tamen ili ja ne estas "nuraj subskriboj surpaperaj", kiuj vere per si mem ne malebligus interŝtatan militon. Mi rigardas ilin pli ĝuste kiel progagandilon, kiel vekilon, instigilon kaj kuraĝigilon por malkonsciuloj. Sed se ĉiuj subskribintoj en okazo de milito fakte plenumos sian devon, pri kiu ili kvazaŭ ĵuris per la sukskribo, vere la militemaj estraroj ne povus sukcesi. Ĉar ili bezonas por militi la proletaron. Ĉu ne ĝuste en tiu momento de mobilizo la proletaro plej bone povus ribeli, forpeli la subpremantojn? Kompreneble ĉiuj, ankaŭ soldatoj-proletoj, devus rifuzi militservon. Belan ekzemplon pri tio montris K-do Muri en "Vojdisiĝo (n-o 229) rilate al Norvegio-Svedio. Ni vidis, kian forton havas la proletaro por eviti militojn; volo, kiu bedaŭrinde mankis en 1914 ĉe la lab. gvidantoj.

Certe la "subskriba metodo" ne estas la sola rimedo por eviti militojn. Ekzistas multaj aliaj. K-do 715 pli rekomendas batali kontraŭ la nuna kapitalisma sociordo por anstataŭigi ĝin per socialisma. Ankaŭ mi tion preferas. Sed ĉu publika deklaro neniam partopreni militojn ne estas ankaŭ batalo kontraŭ la kapitalismo, kiu ja sole kaŭzas la militojn? Mi estas certa, ke la relative malmultaj subskribintoj tute konscie kaj konsekvence subskribis kaj ne nur limiĝas je tiu rimedo por malebligi militojn, sed ankaŭ uzos ĉiun alian vojon por forigi imperialisman militon, — sekve kapitalisman sociordon. Rifuzo de militservo estas samsignifa kun forigo de l' kapitalisma sociordo. La konsciaj subskribintoj certe ne estas kompareblaj kun tiaj "pacemuloj", kiuj volas eviti militon nur, kiam ĝi ne estas necesa por "defendo".

Aŭ ĉu vi timas, ke tiuj militserv-rifuzantoj ĉe eventuala batalo inter proletaro kaj kapitalismo ankaŭ rifuzos batali kontraŭ la kapitalismo? Tute ne. Tre pravas K-do 715 asertante, ke eĉ milionoj da homoj subskribintaj la manifeston ne povus malhelpi batalon interklasan. Tamen, se la kapitalistoj aŭ militistoj minacus per puno la militservrifuzantojn, ĝuste per tio ili ja instigus la rifuzantojn batali kontraŭ la kapitalismo.

Tute ne necesas e k m i l i t i kontraŭ milito. Sed treege necesas b a t a l i kontraŭ ĝi. Estas diferenco inter milito kaj batalo. Batali oni povas ankaŭ per spiritaj armiloj, aŭ almenaŭ oni povas batali evitante grandan buĉadon. Ne indas la kapitalismo, ke oni oferu al ĝi pliajn proletajn vivojn. Estus domaĝe por ĉiu proleto, kiu perdus sian vivon por batali kontraŭ la kapitalismo. Kiel eble plej ni evitu tion!

Helmut Simon (6604).

---

[1] Vidi n-ojn 229, 234.

TRA ESPERANTIO

Jes, de malsupre kaj per praktikado

Responde al la artikoleto de K-do 9124 (n-o 231) mi opinias interesa mallonge rakonti, kiel, malgraŭ la malfavora rilato de gvidantoj, venkas esp-o en junul-komunistaj rondoj de Sovetio.

En marto 1927 ĉe la 5-a Konferenco de VLKSM (Tutsovetia Lenina Komunista Junular-Unio) multaj konferencanoj pledis por esp-o, pruvanta sian praktikan valoron kaj vaste uzata en la internacia korespondado laborista.

Tiama sekretario de Komunista Junular-Internacio, K-do Ŝackin, respondis:

"Kiomgrade ne jam estas kreitaj materiaj premisoj por pli intensa ligo inter apartaj popoloj, kio kreus grundon por elkresko de unueca lingvo, — tiomgrade ĉiuj elpensitaj lingvoj restas posedaĵo de malvasta hom-areto. Ĉu estas celkonforma koncentrigi grandajn penojn de junularo por lernado de la artefarita lingvo, en kiu plenevidente oni ne povas paroli kun amasoj da laboristoj?

"Kiun utilon povas doni esp-o? Ĉu ne estus pli profite ellerni iun vivan lingvon? La sana mastrumeca rezonado montras certe, ke estas pli profite ellerni almenaŭ unu vivan lingvon de granda popolo."

Spite tiu klara malrekomendo al esp-o de la gvidanto, la konferenco akceptis rezolucion, per kiu ĝi

"...komisias al C. K. pristudi la problemon pri esp-o..."

Pasis unu jaro. Dum tiu jaro la praktikado de esp-o kreskis kaj disvolviĝis ankoraŭ pli vaste. Verdire, en la reala internacia korespondado ĝi estis la plej vaste praktikata lingvo, ĉar korespondado en naciaj lingvoj (la "vivaj") malgraŭ la oficiala subteno havis tute malgrandan, sensignifan amplekson.

Kaj jen, ĉe la VIII-a Tutsovetia Kongreso de VLKSM (majo 1928) ree la delegitoj kongresaj (sed nunfoje pli insiste kaj pli multenombre) pledis por esp-o. Kaj ree la sama K-do Ŝackin respondis al la pledantoj:

"Kompare kun la vivaj lingvoj esp-o estas afero morta tiusence, ke ellerninte esp-on vi ne povos konatiĝi kun politika vivo de la lando, vi ne povos legi ĵurnalojn kaj librojn, veninte en tiun landon, aŭ, kiam al ni venas delegitaro (de alilandaj laboristoj), vi ne povos paroli kun la homoj."

Kaj ree li rekomendis studi la naturajn lingvojn, sed ne esp-on. Tamen, ĉar la delegitoj de malsupre tre forte defendis esp-on, en sia konkluda parolo li devis konfesi:

"Ni ne malpermesu al junulkomunistoj okupi sin pri esp-o, kiu deziras — lernu, ni devas gvidi tion..."


La premo, la postulo de malsupre havis sian rezulton kaj la nomita kongreso akceptis jenan rezolucion:

"Esperantistaj organizoj devas esti utiligataj por la internacia interligo. La komitatoj de VLKSM devas gvidi la junul-komunistojn, enirantajn en tiuj ĉi organizoj."

Kion signifas tiu ĉi rezolucio? — Per ĝi oni ne rekomendas lerni esp-on, sed oni rekomendas praktike utiligi esp-on por internacia korespondado.

12-PAĜA N-O ĈIUSEMAJNE

signifas por vi



varbi, varbadi NOVAJN ABONANTOJN!

Ĉu tio ne estas granda venko, konkirita de malsupre? Certe jes, ĉar nur naivulo ne komprenas, ke per rekomendo praktiki esp-on oni jam rekomendas lerni ĝin, ĉar ja oni ne povas praktiki la lingvon, se oni ĝin ne ellernis antaŭe.

Sed ofte la rezolucioj favoraj restas neplenumataj. Kaj ree niaj junaj K-doj montras al ni, kiel de malsupre oni realigas kaj envivigas la rezolucion.

Junul-komunistoj venas al sia regiona komitato de VLKSM kaj diras: ni posedas esp-on, ni eniras la laboristajn esp. organizojn. Konforme al la rezolucio de la VIII-a Kongreso vi devas gvidi nian laboron en tiuj organizoj. Do, donu al ni la direktivojn. Kaj la komitatoj estas devigataj obei al la Kongresa rezolucio, konatiĝi kun laboro de junul-komunistaj esp-istoj kaj doni direktivojn al ili.

Kaj reprezentantoj de junul-komunistaj gvidorganoj jam aliel parolas nun pri esp-o. Reprezentanto de Centra Komitato de VLKSM K-do Kaplan jene parolis ĉe la tuturba Moskva konferenco de junul-komunistaj esp-istoj (la konferenco estis organizita en feb. 1929 de Moskva Komitato de VLKSM):

"Necesas malkaŝe diri, ke esp-ista movado estas granda movado... Junulkomunistaj organizoj devas atenti esp-an movadon, tiun ĉi vastan volontulan movadon, kiu estiĝis spontane, sen ajna premo de supre."

"Junul-komunista organizo neniaokaze povas kaj devas pasi preter tiu ĉi movado, sed ĝi devas utiligi ĝin, kiel ankaŭ ĉiun volontulan movadon."

"...Junul-komunistoj devas utiligi esp-on unuavice por interligi sian VLKSM-ĉelon kun eksterlando..."

Kaj jene diris ĉe la sama konferenco K-do Bekker, reprezentanto de Komunista Junular-Internacio:

"Esperanto estas lingvo de estonto, lingvo internacia. Krom esp-o ekzistas ankaŭ aliaj lingvoj (ido), sed tiuj lingvoj celas skismigi la proletan movadon por la lingvo internacia. Ĝenerale en USSR estas grandaj ebloj por sukcesigo de esp-o. Kaj necesas enkonduki esp-on en lernejoj."

*

Mi rakontis ĉion, por ke ekstersovetiaj junul-komunistoj ne malkuraĝiĝu, se iliaj lokaj gvidantoj malfavore rilatas al esp-o, sed ili daŭrigu praktikadi esp-on kaj postuladi de siaj organizoj, ke ili aprobu utiligon de esp-o.

La cititaj de mi rezolucioj helpu atingi sukceson en tiuj postuladoj.

G. Demidjuk.

Korekto. En la noto "Pri satira versaĵo k ĝiaj sekvoj" (n-o 230, pĝ. 194) enŝoviĝis preseraro, ŝanĝinta sencon de la frazo. En lasta alineo estas presita: "mi **ne** unufoje (sekve: multfoje) allasis iun prokraston", anst.: "mi **nek** unufoje allasis iun prokraston". — G. D.

La Kongres-Komitato aldonas

al la 5-a Komuniko (S-ulo n-o 234):

Veturprezoj per rapidvagonaro — 3-a klaso

(Ĉar konstante Gek-doj ankoraŭ demandas pri veturprezoj, kvankam en n-o 222 de "S-ulo" ni jam publikigis ilin, ni denove presigas.)

Berlin—Leipzig	7.70
Bruxelles—Leipzig	31.90
Budapest—(Praha)—Leipzig	36.80
Bukarest—(Praha)—Leipzig	67.20
Danzig—Leipzig	28.40
Düsseldorf—Leipzig	24.60
Kehl—Leipzig	27.60
Kiev—(Berlin)—Leipzig	56.00
Köln—Leipzig	25.40
Königsberg—Leipzig	33.20
Leningrad—(Berlin)—Leipzig	79.50
London—(Ostende)—Leipzig	56.25
Malmö—Leipzig	35.80
Minsk—(Berlin)—Leipzig	45.65
Moskvo—(Berlin)—Leipzig	80.20
München—Leipzig	23.20
Paris—(Köln)—Leipzig	40.60
Praha—Leipzig	15.90
Riga—(Königsberg)—Leipzig	45.00
Saarbrücken—Leipzig	27.00
Stettin—Leipzig	15.20
Trier—Leipzig	28.00
Varsovio—(Breslau)—Leipzig	34.30
Vieno—Leipzig	31.50
Zürich—Leipzig	34.90

El la Redaktejo

Ni adiaŭis senceremonie la 8-paĝan "S-ulo"n. Per la pligrandigo de l' gazeta amplekso je triono ni kvazaŭ elpaŝis el la embria epoko. La infano kreskas. Plivastiĝas la kadro, la laborkampo. En tiu momento pliiĝis taskoj kaj ebloj por la Redakcio. Ni povos konsideri por presigo pli da alsendataj manuskriptoj ol ĝis nun. Pli da artikoloj havos ŝancon esti konigataj per "S-ulo" al tutmonda legantaro, esti utiligotaj en vastaj proletaj rondoj por la profitkonto de nia movado. Nia influsfero sekve povos kreski.

Sed la utiligo de materialo ricevota restos ankaŭ estonte proporcie nur la sama kiel ĝis nun: 1. ĉar pli multaj K-doj kunlaboras, la rondo estas pli granda ol en la unuaj jaroj; 2. ĉar ni ne povas — kaj pro edukaj celoj ne volas — konsideri malbone verkitajn manuskriptojn. Tio lasta ne unuavice rilatas al lingvo, stilo kaj skribmaniero, ĉar ĉio tio estas korektebla en la redaktejo. Ĝi ĉefe rilatas la enhavon, la elektitan temon.

Niaj kunlaborantoj devas kompreni, ke ni ne bezonas tradukojn, escepte se temas pri aparte interesaj kaj ne ĝenerale konataj temoj; plie, ke ni ne bezonas sciigojn pri okazintaĵoj disvastigataj sammaniere kaj samforme jam en tutmonda gazetaro; fine, ke ni ne akceptas artikolojn, kiuj enhavas insultojn al iu ajn laborista tendenco reprezentita en SAT. Originalajn artikolojn pri gelaborista vivo kaj laboro, kutimoj kaj moroj, laŭ propraj spertoj kaj observoj, ni plej volonte akceptas; ankaŭ ilustraĵojn al tiaj artikoloj ni ŝatas presigi. Tro abstraktajn, teoriajn temojn oni evitu. Malgraŭ 12-paĝaj n-oj — verku koncize kaj klare!

Kial ni opinias necese denove precizigi tion kelkfoje diritan antaŭ vi? Ĉar temas pri fundamentaj disciplinoj. La legantoj ja havas rajton postuli de la redaktoro kontentigon je siaj klerigaj bezonoj. Sed por ke la redaktoro povu konformiĝi al la deziro de l' legantaro, necesas unuavice, ke la kunlaborantoj observu regulojn, leĝojn, disciplinon kaj ne tro malfaciligu la redaktoran taskon. Ĉar la gazeto apartenas al ni ĉiuj, legantoj kaj kunlaborantoj, devas ekzisti nedisigebla spirita ligo inter ambaŭ faktoroj, kaj la redaktejo estas nur teknikilo, kiu peras, prilaboras, transformas kaj legeble prezentas la legindan kaj konigindan materialon.

N. B.

Havigu al vi nepre

La Laborista Esperantismo

la novan, en klara, bela lingvo verkitan broŝuron de *E. Lanti.*

40 pĝ. Prezo: 0,40 mk. g.

Mendu ĉe la Administrejo:
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

NORMIGO

SAT-anoj uzu unuecajn formatojn!

K-do Krjukov en sia artikolo "Praktikaj kulturtaskoj de SAT" publikigita en la Jarlibro 1928 atentigas i. a. pri la dezirindeco, ke SAT-anoj akcelu "normigon (samgrandigon kaj en konformaj okazoj samformigo) de ĉiuj amase produktataj objektoj, por ke ili estu same facile uzataj kaj aplikataj en ĉiuj landoj de l' mondo (partoj de maŝinoj, ŝraŭboj, lampoj, seĝoj, litoj, gazetoj, libroj ktp.)".

Sendube la SAT-anoj, kiuj ja ne nur volas enkonduki raciigon sur lingva kampo, sed ankaŭ celas al raciigo kaj tutmondigo de la tuta soci-mastrumado en la plej larĝa senco, devas kiel eble plej multe favori la enkondukon de unuecaj formoj kaj grandoj por ĉiuspecaj tutmonde uzataj objektoj. Sed multrilate ni, SAT-anoj, ne povos fari ion alian ol diskonigi kaj popularigi la ideon de normigo. Enkondukon de normoj en la diversaj industrioj ni, kelkmila SAT-anaro, ne povos efektivigi.

Ŝajnas, ke provizore nur sur la kampo de normigo de paperformatoj SAT-anoj povos fari ion konkretan. Ili povos jam nun enkonduki inter si la uzadon de fiksitaj unuecaj formatoj por poŝtkartoj, leteroj, manuskriptoj, libroj, gazetoj ktp. Ĉi tio havus ne nur idean, principan signifon, sed eĉ jam praktikan, materian valoron.

Ĉu ne estas absurde, ke niaj ĉ. 30 SAT-eldonaĵoj, inkluzive gazetoj kaj jarlibro, havas pli ol 10 malsamajn formatojn. Racio ja ordonas, ke la formatoj kiel eble plej malmulte diferencu inter si. Sufiĉus 3 aŭ 4 formatoj, nome: unu por grandaj eldonaĵoj ("S-ulo" kaj Terbiblio), unu por ordinaraj libroj kaj revuoj (Eklumo en abismo, Etiko, La Nova Epoko) kaj unu por poŝformataj eldonaĵoj (B. de S., Jarlibro, ilustritaj poŝtkartoj). Eventuale, se cirkonstancoj nepre necesigus ĝin, oni povus aldoni ankoraŭ kelkajn inter-formatojn. Sed eĉ en tiu okazo oni ankoraŭ ne atingas la nombron 10!

Plie estus ankaŭ granda avantaĝo, ke ĉiuj SAT-anoj uzu samformatan paperon por leteroj, manuskriptoj, poŝtkartoj ktp. Tio ege plifaciligus la konservadon kaj ordigon de tiuj paperaĵoj.

Do ne nur pro principaj motivoj, sed ankaŭ pro praktikaj konsideroj estas dezirinde enkonduki en SAT la uzadon de unuecaj formatoj.

La demando nur estas: kiaj formatoj estas plej taŭgaj kaj uzindaj? Feliĉe ni ne bezonas mem elpensi aŭ elserĉi ilin. En multaj landoj jam ekzistas komitatoj aŭ komisionoj por normigo de diversaj objektoj. Tiaspeca komisiono en Germanio fiksis serion da formatoj por papero, la t. n. D. I. N.-formatoj[1]. Ĉi tiuj formatoj ankaŭ jam estas aprobitaj aŭ rekomenditaj en diversaj aliaj landoj, i. a. en Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Norvegio, Sovetio[2], Svedio kaj Svisio.

Ilia bazo estas surfaco de 1 kv. metro, kies longo kaj larĝo rilatas unu al alia kiel 1.41 : 1. Ĉi tiu estas la sola mezuro, je kiu la proporcio inter longo kaj larĝo restas la sama, se oni duonigas ĝin. La baza folio de 1 kv. metro (nomata Ao) havas longon de 1189 m. m. kaj larĝon de 841 m. m. El la unua duonigo rezultas 841×594 m. m. (A 1), el la dua 594×420 m. m. (A 2), plie 420×297 m. m. (A 3), 297×210 m. m. (A 4), 210×148 m. m. (A 5), 148×105 m. m. (A 6), 105×74 m. m. (A 7), 74×52 m. m. (A 8) ktp.

Ĉi tiujn formatojn, kiuj servas por uzpretaj paperoj (leterpapero, cirkuleroj, poŝtkartoj ktp.) oni nomas serio A. Krome ekzistas ankoraŭ serioj B, C kaj D, kies formatoj povas esti uzataj por aliaj paperaĵoj (kovertoj, leterujoj, k. a.) kaj en tiuj okazoj, kiam la formatoj el serio A nepre ne estas uzeblaj.

Por ordinara uzado servos la formatoj A 4, A 5 kaj A 6. El ili A 4 estas uzata por grandaj leteroj kaj manuskriptoj; faldante ĝin oni havas A 5 uzebla por malgrandaj leteroj, cirkuleroj ktp.; duonigante A 5 oni havas formaton A 6 por poŝtkartoj ktp.

Oni nun jam povas (eĉ devas) rekomenci la uzadon de ĉi tiu sistemo. Ni tamen ŝatus esti informataj pri la uzado aŭ rekomendo de unuecaj formatoj en la tuta mondo kaj interrilati kun diverslandaj K-doj, kiuj interesiĝas pri ĉi tiu temo. Ankaŭ el Usono, kie ekzistas alia sistemo bazita sur ne metra mezurado, ni volonte ricevos informojn. Oni skribu al unu el subskribintoj.

G. P. de Bruin,
Twekkelerweg H 187 g, Lonneker, Nederl.
P. Karuzin,
Trubnikovskij 19, kv. 13, Moskvo, USSR.

[1] Fakte la D. I. N.-formatoj bazas sur la laboroj de la fama germana scienculo W. Ostwald, kiu jam en 1911 proponis similan sistemon. Sed li prenis kiel bazon ne surfacon, sed flankon (1 cm.). La fakuloj opiniis pli oportune por si mezuri laŭ surfaco.

[2] En Sovetio speciala "Narkomato" enkondukas D. I. N.-formataron, iom pli prilaboritan, stariginte formatojn por fabrikaĵoj paperaj, unuecigitaj kun uzformatoj en unu geometri-proporcia sistemo.

Baloto pri nova Ĝenerala Konsilantaro

Laŭ sciigo ĵus ricevita de K-do **Michalĉka Ŝ.** (1187), Sebastopol, tiu K-do anoncis per poŝtkarto datita de 10. 1. 29 sian kandidatecon. Tiun poŝtkarton ni ne ricevis, sed ni ne havas kaŭzon por malfidi pri la vereco de l' aserto de nia K-do. Sekve lia nomo aperos en la kandidatlisto inter la kandidatoj por la 2-a horzono.

Direkcio de SAT.

INTER NI

Kun kordoloro mi eksciis pri la morto de K-do Neĝam Mohamed. Tiu fervora junulo apenaŭ ekpaŝis sur la vojo al plena spirita liberiĝo, kaj jen li falis mort-trafite . . .

Neĝam estis jam liberiĝinta el la malsaĝaj religiaj kutimoj arabaj. Ne povas esti dubo, ke li ankaŭ liberiĝus el la nacia sento kaj fariĝus vere plenkonscia sennaciulo.

— Sed tia li estis, eble protestos liaj amikoj el la grupo „Ĉiam antaŭen!“ . . .

— Ne, karaj K-doj. Neĝam estis nur araba patrioto, eble bona internaciisto, sed nenio pli. Vi mem konfesas tion dirante: “. . . li sincere malamis Francion, kiu sklavigis liajn samrasanojn.“ Konsekvenca sennaciulo malami ne povas iun ajn landon; li malamas nur la ekspluatadon, la maljuston, la fanatikon, la tradicion . . .

— Nu, ŝajnas ke vi mem estas patrioto: vi ja defendas la francan imperialismon kaj konsentas la sklavigon de la francoj al la araboj! Vi . . .

— Ne tiom ekscitiĝu. Aŭskultu kaj penu kompreni.

Ĉu do la arabaj proletoj estis liberaj, antaŭ la alveno de la francoj? Tute ne. Ili estis sklavoj de siaj ŝeikoj (tribestroj), ili estis sklavoj de sia mahometana religio; tiutempe inter ili ne estus eble eĉ paroli pri liberpensa, komunista propagando. Se tia stato daŭrus, neniam nia K-do Neĝam estus fariĝinta esperantisto, neniam estus veturinta al Göteborg kaj tie en SAT-anio traktata kiel frato kaj egalulo.

Mi, kiel Neĝam, estas nur franca ŝtatano, sed ne franco. Mi ja naskiĝis en Normandio, kiu perdis sian sendependecon antaŭ pluraj jarcentoj. Sed mi sentas neniam emon por la nacia liberigo de la normandoj el la “jugo“ de Francio. Normanda aŭ franca patriota sento tute forestas ĉe mi. Tiagrade, ke dum la granda milito mi ne malofte eldiris al K-doj la penson, ke la venko de Germanio estus preferinda pro la pli alte evoluinta tekniko de tiu lando.

— Kial do vi ne volontiĝis en la armeo de Vilhelmo?

*— Tial ke mi ankaŭ ne povus fariĝi germana patrioto. Mi konstatis, ke germanaj kaj francaj patriotoj mortigas sin reciproke; tion malhelpi mi ne povis kaj sekve el tiu okazo mi deziris, ke rezultu kiel eble malplej da malbono. Mi konstatas, ke homoj volas konservi siajn nacian lingvon, naciajn kutimojn, nacian sendependecon ktp. kaj por tio estas ĉiam pretaj morti kaj mortigi. Por tiaj celoj konsekvenca sennaciulo ne povas v o l e oferi sian vivon. Li bedaŭras, ke la historia procezo ne okazas laŭ racia metodo. Tia metodo estus forlaso de ĉio nacieca, unuiĝo per la helpo de artefarita lingvo de ĉiuj proletoj el la mondo por liberiĝo el la kapitalista jugo. Unuvorte la sola racia batalo estas la **k l a s b a t a l o**, ne la nacibatalo. Sed kompreneble mi ne volas malhelpi al iu ajn nacibatali, se plaĉas. Kaj, se iu nacibatalanto sin nomas “sennaciulo“, nu, por mi tio estas nur amuza . . .*

Tro frue mortis nia K-do Neĝam por povi akiri plenan spiritliberiĝon, tial lia antaŭtempa morto estas despli ĉagrena.

E. L.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

DANIO. Odense. 24. 2. okazis nia ekspozicio en Nova Kunsid-konstruo. Dank' al multa el eksterl. rivecita materialo la ekspoz. estis bona sukceso. Proks. 200 pers. vizitis ĝin. Plej grandaj lokaj ĵurnaloj atentigis pri ĝi. Post iuj “miskomprenoj“ ankaŭ neŭtraluloj partoprenis. Nia komitato aprobis aranĝi 2 kunvenojn monate, ĉe kiuj ni parolas nur esp-e. La paroloj traktos div. priesp-ajn temojn k. a. (11 082). — **FRANCIO.** En B a y o n n e de kelkaj hispanaj k francaj K-doj estis fondata lab. esp. grupo, kiu aliĝis al FEO. En kurso, kiun gvidas K-do Dattas, partopr. 25 p. (3949). — **SOVETIO. Dnepropetrovsk.** Daŭraj, malrapidaj progresoj. En la urbo funkcias 14 kursoj kun 170 pers. Multon lokaj esp-istoj esperas de 3 grandaj esp. junkom. seminarioj kun 80 p. Ili organiziĝis laŭ iniciato de distrikta junkom. estraro k estas unua provo k sperto por tuta Sovetio. Ili lokiĝas en tri div. urbpartoj. Ili estas gravaj por ni, ĉar ili konsistas el plej aktivaj junkom-istoj. Plej multon ĉe organizo de tiuj kursoj ni ŝuldas al lastatempe aktive partoprenanta nian movadon K-do A. Marti (13 528). Loka radio-stacio komencis disaŭdigi “esp. bultenon“. Redaktas ĝin K-doj Kudrjavicki k Marti. La loka gazetaro estas favora, ĉar la ĉefredaktoroj estas malnovaj esp-istoj k SAT-anoj. En ĉiuj magazenoj k fabrikaj libro-vendejoj oni trovas esp. lernolibrojn k ankaŭ nian literaturon. Por la SAT-rondo K-do Kudrjavicki nun estas peranto (ĉar K-do Kotelevcev ne plu loĝas en D.). Oni korektu en Jarlibro. La lokaj esp-istoj preparas sin por SAT- k SEU-konferencoj en aprilo. (10 262.) — **Kozlov** (tamb.) Funkcias du rondetoj: 7 p. ĉe sindikato de poŝtistoj, 8 p. ĉe 3-a apoteko. Kunvenoj ĉiudimanĉe. 4 SAT-anoj, 3 SEU-anoj. Antaŭ ekzisto de tiuj rondetoj oni nenion sciis en la urbo pri esp-o; nun la intereso ekkreskas. (12 974.)

HENRI BARBUSSE

Eklumo en la abismo

Kun antaŭparolo de la aŭtoro al la esperanta eldono.

Sub la freŝaj impresoj de la mondmilito la fama aŭtoro verkis tiun ĉi plaĉe prezentitan 96-paĝan verketon. Forta protesto kontraŭ la milito, esploro de ĝiaj radikoj kaj pasia kulpigo al la kapitalista sistemo!

—o—

Ni rekomendas la libron varme al ĉiuj K-doj, kiuj iom perfektiĝis en nia lingvo kaj volas ĝui meditigan legaĵon.

Prezo: 0,80 mk. g.

Havebla ĉe Administrejo de SAT



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Alekso Tolstoj, Aelita, aŭ La Marso formortanta. Romano. El rusa trad. E. Pill. Ilustrita de G. Schmidt. Eld. Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsseler Str. 94. 199 pĝ. Form. 13½×20 cm. Prezo kart. 3.20 mk. g. (sv. fk. 4.—), duontole bind. 4.80 mk. g. (sv. fk. 6.—).

Ie skribis Göte (germ. Goethe) en “Lernjaroj de Vilhelm Majstr“, pri teatro: “Por distri simplulojn, sufiĉas movo antaŭ iliaj okuloj. Por distri sentemulojn, necesas ilin emocii. Por distri sciemulojn, necesas ilin ankaŭ pensigi.“

“Do, meditas simpluloj-aŭtoroj: mi verkos movon, movadon, movegon. Simpluloj legos min. Ili estas plimulto en la mondo: mi sukcesos.“ Ĉu vi rimarkis tion: nur stultuloj asertas, ke la publiko estas stulta.

Sed eĉ verki movon, ne sukcesas tiuj aŭtoraĉoj. Grundo, aero, maro, vivo estas por ili tro malgrandaj. Ili nur sukcesas sin movi inter ĉieloj, planedoj, mondaroj. Sed ho ve! Trakurante tiajn astrajn distancojn, ili ne sukcesos verki movon k enuigas eĉ la simplulojn per la senmoveco de milionkilometraj aventuroj. Relativeco!

“Aelita“, de Alekseo Tolstoj (atentu, ne L e o Tolstoj), ne estas la plej malbona el inter fantaziaj romanoj. Kvankam ĝi estas tre malbona, stultega, stultiga. Du rusoj alflugas planedon Marso, per ridinda aparato. En Marso ili trovas loĝantojn, bluhaŭtkolorajn k pintnazajn. Ĉu vi volas, ke mi diru al vi, kial ili estas bluhaŭtaj? Tre simple. Sur tero vivas blankuloj, flavuloj, ruĝuloj, nigruloj. Do, por originala fantazia verko necesis ke la M a r s a n o j bluhaŭtiĝu aŭ verdhaŭtiĝu. Tolstoj (Alekseo) elektis bluon. Vi pensu, kiom interesaj povas esti, fabrikitaj laŭ la sama infana sistemo, la maŝinoj, la kreskaĵoj, la prahistorio de Marso. Vi deziras teruran animalon? Do, pligrandigu araneon ĝis amplekso de bovo. Jen Marsa animalreĝo. Kia mirinda imagpovo, ĉu ne?

Nur ridinda senbeleco, senklereco, senutileco. Jen verko de ido de Leo Tolstoj. Ni jam sciis, ke infanoj de Tolstoj perdis tempon, burĝege vivis, amuziĝis k ludis dank' al verko k riĉeco de la genia patro, dum li klopodis eduki kelkajn vilaĝanojn, mem perlaboris siajn ŝuojn k skribverkis hombonige, pasie, sincere, eĉ kiam li eraris. Leo Tolstoj ne sukcesis kontraŭi la luksan, senutilan vivon de sia familio, tre suferis pro tio k fine, iun nokton, forkuris k mortis.

Antaŭ la verko de Alekseo Tolstoj li ankaŭ forkurus.

Pri la ridindaj kontraŭhomaj, kontraŭrevoluciaj, kontraŭsovetiaj pikoj k predikoj en tiu libro mi eĉ ne parolos. Iam pretendeman supraĵan pesimismon de elreviĝinta burĝo, ĉion malŝatante, ĉar li ne plu regas, ŝajnigas la aŭtoro. Ni trovas ĉe Lük Dürten' (aŭ eble ĉe Dühamel'), anekdotan aludon pri la rusa, ofte ĉarma “rasgovor“, tiu babilado dum nokto, post kiu vivo, artoj, filozofioj, verŝajnoj, en matenruĝo kuŝas dispecigitaj, mortaj. La babilantoj foriras matene el “rasgovorejo“, kun stranga malpleneco en kapo, kun amara buŝo.

“Aelita“ parencas al “rasgovor“, sed rasgovor infana, mallertega. J i e f.

J. Stalin, Pri Lenin. Trad. el rusa lingvo P. Tilin; lingva kontrolo N. Hohlov. Moskvo 1929. Eld. Kom. Frakcio de SEU. 24 pĝ. Form. 11×15 cm. Prezo 0.15 rbl. (0.30 mk. g.). Havebla ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

La libreto enhavas nur kelkajn mallongajn ĉapitrojn el la verko "Pri Lenin k leninismo", personajn, tre vive priskribitajn impresojn pri karaktero, antaŭvidemo k gvidkvalitoj de Lenin. Estas linioj kapablaj ekflamigi en ni novan admiron por geniulo de l' revolucio. Stilo k lingvo de l' traduko estas bonaj.

N. B.

S. Ŝabarin, Lerna esperanta krestomatio. Aprobita de Lingva Komisiono ĉe SEU. Eld. CK SEU, Moskvo 1928. 70 pĝ. Prezo: 0.40 rbl. (0.80 mk. g.). Form. 13×17 cm. Hav. ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Legolibro enhavanta 46 rakontojn, priskribojn, klerigajn artikolojn, poemojn, prilingvajn ĉapitrojn; ĉio kun lingvaj komentoj rus-esperantaj. Certe tiu ĉi verketo sperte kompilita k zorge aranĝita respondos al la deziro de progresantaj studantoj de nia lingvo, kiuj bezonas perfektigan k ekzercan materialon. Lingvajn mankojn ni ne trovis.

N. B.

V. Svistunov, Elementoj de Esperanto. 3-a eldono, 26-a—35-a miloj. Moskvo 1929. Eld. CK SEU. Spiridonovka 15, Moskvo. 96 pĝ. Prezo 30 kop. Form. 13×17 cm.

Tiu ĉi lernolibro por komencantoj ruslingvaj aperas jam en la tria eldono. Tio montras ĝian ŝatatecon k praktikecon pli bone ol iu alia fakto. La malalta prezo certe akcelos rapidan disvendiĝon k ebligas ankaŭ al la plej malriĉa lernanto aĉeti ĝin.

S. Rublev, Esperanto-Rondeto (Kruĵok-Esperanto). Praktika helpilo por grupa studo de esp-o. Parto I. Por rondetanoj. 3-a eldono. 17-a—31-a miloj. Eld. CK SEU. Moskvo. Form. 17×26 cm. 64 pĝ. Prezo 1.— mk. g. Hav. ĉe R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Ankaŭ tiu metode k trafe prilaborita tekstlibro por grupa studo trovas, kiel montras la granda eldonkvanto, rapidan disvastiĝon en Sovetio; ne senmerite. Ankaŭ alilandaj studgrupoj povus utiligi ĝin al si; sed necesas atentigi alilandajn Gek-dojn, ke ĝia enhavo ne estas superpartia, ĉar ĉefe destinita por sovetianoj, kies spiritostato formiĝas en specialaj kondiĉoj de unupartieca influo. La libro estas valora instruilo; ni nur bedaŭras la uzadon de vortoj "mitingo" anst. amaskunveno, "demonstracio" en senco de manifestacio, "organizacio" anst. organizo. N. B.

E. Drezen, Elementoj de lingvoscienco, de historio kaj teorio de Lingvo Internacia. Studlibro por rondetoj k rondet-gvidantoj. Moskvo 1929. Eld. CK SEU. Form. 13×17 cm. 136 pĝ. Aŭ poparte je 49, 42 k 40 paĝoj. Prezo: Por la apartaj volumetoj 20,20 k 25 kop., por la tuta volumo en unu 70 kopekoj.

Ruslingva studo, kiu dividiĝas en jenajn tri partojn: I. La lingvo k artefariteco en la lingvo. II. Evoluo de l' ideo pri Lingvo Internacia (de Dekart' ĝis nuna tempo). III. Disvastiĝo, utiligo k vojoj de plua formiĝo de Lingvo Internacia (kun font-registro en la fino). Ĉar neniu en la Redaktejo posedas la rusan lingvon, al ni ne estas eble fari priĵuĝon pri la valoro de la verko. Sed sendube tiaj teoriaj verkoj povas havi grandan valoron por studantoj de nia lingvo, al kiuj ili liveras gravan inform-materialon. Teoria scio tre faciligas pluan varbadon precipe en skeptikaj rondoj. N. B.

Esperanto kaj I. T. F.

Ni legas en Bulteno de I. T. F.: Sekve de propono de aŭtomobil-kondukistoj el Göteborg, la lasta kongreso de l' sveda transportlab. unuiĝo decidis en siajn statutojn inter la organizaj celoj meti jenan punkton: "Apogi k akceli esperanton kiel internacian helpan lingvon." Alia propono prezentita al la Kongreso rilatis al kolektiva aliĝo de l' organizo al Sveda Lab. Esp. Asocio, kun la komento, ke tiu asocio jam enregistris preskaŭ 70 kolektiv-aliĝojn de sindikataj organizoj, inter ili la marista unuiĝo k dekkvino da fervojistaj sekcioj. Tiu propono estis transdonata al la Ekzekutiva Komitato.

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Planitzer Ztg., 20. 2., Sveda jun. k esp-o; Volksstimme, Chemnitz, 5. 3., El Litovio; Travail, Lyon, 5. 1., Memmortigoj en Hung., 15. 12., Kapital. en Afriko; La Solidarité, Nice, 5. 1., Memmortigoj en Hung., 22. 12., Kapital. en Afriko; L' Effort, Lyon, 15. 1., Memmortigoj en Hung.; La Flamme, St. Etienne, 24. 11., El Italio (205).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 7. 3.; The Labour Women, London, marto (rubr.); Le Travailleur, Troyes, 9. 3.; L' Anarchie, Paris, dec.; L' Avant-Garde, Tours, 21. 11.; L'Effort, Lyon, 1. 12.; Le Combat Syndicaliste, Lyon, nov.; Le Populaire, Paris, 7., 13., 16., 21., 22., 24., 30. 1., 4., 18. 2.; La Volonté de Paix, Levallois-Perret, dec.; La Lorraine, Metz, 19. 1.; La Voix des Jeunes; Ballan-Miré, jan.; Harthaer Tagebl., 6.2.; Falkensteiner Anzeiger, 23.2.; Limbacher Tageblatt, 16., 22. 2.; Planitzer Ztg., 14. 2.; Volksstimme, Chemnitz, dum febr. 11 notoj; Der Kämpfer, Chemnitz, 5. 3.; Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 3. 3. (2 art.).

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Planitzer Ztg., 8. 2.; Harthaer Tagebl., 2. 2.

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 9. 3., Le Drapeau Rouge, Bruxelles, 9. 3. (2 let.); Sächs. Arb.-Ztg., Leipzig, 12. 3.; Limbacher Tagebl., 12. 2.; Volksstimme Chemnitz, 5. 2.; Leninec, Rostov, 6., 20. 10., 1., 9., 22. 12.; Slovo ot Stanka, Rostov, 8. 1.; Molot, Rostov, 23. 2.; Za Mir i Trud, Novoĉerkask, 27. 2. (let. de ruĝfrontb. Leipzig al nordkaŭk. ruĝarm.).

En Nord-Kaŭkazlanda ĉiutaga junkom. ĵurnalo "Bolŝevistskaja Smena" (Rostov) komence de aprilo estos presataj esp. lecionoj. Grava sukceso! Aliaj gazetoj imitu la ekzemplon! (5458.)

NIA POSTO

6727. — La de vi eltrovita "grava eraro" estas viaflanka. Ŝajne, legante pri "krom" en KABE, vi ne rimarkis, ke tiu vorteto havas du signifojn k ke en nia kazo la dua signifo estas trafe esprimita, ĉar la homaro ja enhavas la banditojn; sekve "ne nur . . . sed ankaŭ" laŭsence ne estas aplikebla. — Artikolo pri kongresanoj ne aperos, tiu pri fraŭleco jam aperis. — N. B.

10 662. — Jes, la traduko ŝajnas al ni presinda; verŝajne ĝi aperos en iu n-o fine de aprilo aŭ komence de majo. Same la artikoleto por "L. L.".

10 262. — Alvokojn ni ne povas enmeti senpage.

13 697. — Via artikolo aperos.

Kolektivano. — Al vi mem vi devus diri: "Urĝegas" du semajnojn pli frue. Feliĉe ni ricevis en oportuna tempo samteman artikolon de alia K-do. El la antaŭa materialo ni ĝis nun ne trovis okazon aperigi la longajn tradukojn; ĉiuokaze ni gardas tiun materialon, kiu ne malaktualiĝas. La privirinan art. ni plej baldaŭ aperigos, same aperos "La Kamparano" en "L.L.". — Red.

14-an de aprilo

precize je la 21-a horo laŭ Mez-Eŭropa Tempo okazos

Esp. Radio-koncerto

dediĉita je la memoro de D-ro Zamenhof. Ĝi estos transdonata per Radio-stacio je la nomo de Komintern, ondlongo 1450 m kaj estos aŭdebla en tuta Eŭropo . . . Do bonvolu tiun ĉi gravan anoncon presigi en viajn tagĵurnalojn kaj gazetojn kun peto nepre senprokraste informi pri aŭdebleco kaj impresoj al adreso:

MOSKVO, Poŝtkesto 701, al Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo.

Muzik-gvidanto de la koncerto estos Sergej Boguslavskij, Esperanto-gvidanto Viktor Ĵavoronkov.

NI SERĈAS:

seriozajn korespondantojn el ĉ. l. pri lab. temoj, turismo, sporto, por "Amika Rondo", naturamika junular-grupo kaj gimnastikuloj.

NI INTERŜANĜAS:

L, PI bfl, gazetojn, ĵurnalojn ktp.

Adr.: *Heil August, Ludwigshafen a. Rh., Seilerstr. 2a, Germanio.*

ENHAVO:

	paĝo
Inteligento, Filozofio kaj Marksismo	237
La sekvoj de sendependiĝo . . .	238
Soveta Alasko	239
Kulturreakcio en Germanio . . .	239
Ministaj strikoj en Hungario . . .	239—40
Vizito al la sovetia ŝipo "Dekabristo"	240
Iomete pri hejmindustrio en la Metalmontaro	241
Faktoj sen komentoj	241
Fajrego en pensiono	242
Ekstera komerco de USSR en pasinta jaro	242
Diversaĵoj	242
Sennaciula Liberpensula Paĝo . .	243
Diskutejo	244
Tra Esperantio	245—48

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)